

## Elpaŝo de ILEI pri instruista trejnado

Delonge ILEI kernas sur tiu kampo, ĉu organizanta mem kursojn, ĉu subtenante (ankaŭ finance) la projektojn de aliaj agantoj. Tiuj liverantoj, kvankam laborante de esence komuna stud-plano, ĉiam pli disiras kaj evoluigas siajn proprajn solvojn kaj financajn strukturojn. ILEI pro manko de rimedoj kaj laborfortoj tra lastaj jaroj postrestis. Jen provo ŝanĝi tion, por ke ILEI ludu sian naturan rolon, per la kunordigo de la diversaj iniciatoj, al iu kohera oficialigebla bazo. Sube, legu tekston liveritan al la prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio (Sean O'Riain), kiu jam havas kontaktojn kun ALTE (la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo). UEA same havas rilatojn kun ALTE; ilia nomumito estas estrarano de ILEI, do ni havas manierojn aliri tiun organizon kun la sekva koncepto.

----- teksto -----

## Instruista Trejnado por instruistoj de Esperanto

Instruista trejnado estas ofertata en Eŭropo kelkloke, kun diversaj liver-metodoj kaj gradoj de oficiala akceptigo.

La Universitato Adam Mickiewicz en Ponzano, Pollando, ofertas trijarajn kursojn en Interlingvistiko, kiu inkluzivas studunuojn pri instrua metodologio. Ĉi tio estas oficiale agnoskita kurso. Per rimedoj el ĉi tiu kurso, serio da unujaraj kursoj specife pri instruista trejnado estis, ĝis lastatempe, ofertataj.

Ankaŭ Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) ofertas intensivajn kursojn, tipe kun unu- aŭ du-semajna daŭro.

La organizo kaj retejo <edukado.net> starigis programon de retbazita trejnado, utiligante interalie vidbendajn materialojn prezentante model-lecionojn kaj aliajn instru-situaciojn.

Ĉiuj el ĉi tiuj programoj uzas variaĵojn de baza studplano, kompilita antaŭ kelkaj jaroj. ILEI nun laboras rafini ĉi tiun dokumenton por produkti flekseblan modulan kadron. Ĉi tio difinus normojn kaj strukturojn, kiuj tamen donas maksimuman flekseblon al la trejnadaj liverantoj, por akomodi iliajn proprajn bezonojn ene de tiu kadro. La modulara strukturo liveras flekseblon ankaŭ al la trejnotoj. Ili povos elekti kiujn trejn-programojn sekvi, en kiu ordo ili plenumu la postulojn kaj je kiu rapideco – kun la kapablo fine kunigi ĉiujn rezultojn, trapasi ekzamenan procezon kaj ricevi diplomon.

Kiam la programa rafinado estos finita (kunlabore kun la liverantoj) la tasko por ILEI estos konsentigi la liverantojn labori ene de tiu unuigita strukturo. Tiam, kunlaboro povas esti starigita inter ILEI, la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA). La celo estos proponi ĉi tiun programon al edukaj instancoj, je nacia, eŭropa aŭ internacia nivelo, por ke ĝi ricevu nivelon de oficiala subteno kaj rekono.

Lingvaj ekzamenoj en Esperanto estas jam oficiale rekonataj de eŭropa instanco (ITK en Hungario), ĉar ili konformas al KER – la Komuna Eŭropa Referenckadro. Fakte, ĉi tiuj ekzamenoj, ofertataj tutmonde, bezonas regule plukonstruatan kadron da rajtigitaj ekzamenantoj, kiuj devas demonstri ne nur lingvan kapablon, sed ankaŭ montri atestilojn pri instruista metodologio. Akceptita sistemo de instruista trejnado provizus manieron por pli da esperantistoj akiri konvenan atestilon. Ĉi tio klarigas, kial ni volas esplori la eblojn ene de ALTE (la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo), por ke la programo estu rekonata je eŭropa nivelo.

Jen la teksto en la angla sendita al la prezidanto de EEU, por eventuala pludono al la reprezentantoj de ALTE, aŭ por servi kiel bazo por parola sondado.

## Teacher Training for Esperanto instructors

Teacher Training is available in Europe at several locations with varying delivery methods and degrees of official acceptance.

The University Adam Mickiewicz in Poznan, Poland offers three-year courses in Interlinguistics, which includes sections on teaching methodology. This is an officially credited course. Using resources from this course, a series of one-year courses specifically on teacher training were until recently offered.

The International League of Esperantist Instructors (ILEI) also offers intensive courses, typically of one- or two-week duration.

The organization and website <edukado.net> has established a programme of web-based training, utilizing, among other things, video material capturing model lessons and other teaching situations.

All these programs use their own variations of a basic curriculum, drawn up some years ago. ILEI is now working to refine this document to produce a flexible framework with a modular structure. This would establish norms and a structure, that still gives maximum flexibility to training providers to cater for their own needs within that framework. Its modular nature provides those seeking training with flexibility, too. They can choose which training programs to follow, in which order they fulfill the requirements and at what speed – with the ability to finally bring all the results together, pass through an examination phase and receive a diploma.

Once this programme refinement is done (in cooperation with the deliverers), the job of ILEI will be to get these training deliverers to accept working within a unified structure. Then collaboration can be set in motion between ILEI, the European Esperanto Union (EEU) and Universal Esperanto Association (UEA). The goal would be to propose this program to educational authorities, at either the national, European or World levels, to have it gain a level of official support and recognition.

Language examinations in Esperanto are already officially recognized by a European body (ITK in Hungary), since they conform to CEFR (Common European Framework of Reference for Languages – in Esperanto: KER – Komuna Eŭropa Referenckadro). In fact, these examinations, offered world-wide, require a regularly augmented body of certified examiners, who are required to demonstrate not only their language proficiency, but also present qualifications on teaching methodology. An accepted system for teacher training would provide a means for more esperantists to acquire a suitable qualification. This explains why we would like to explore the possibilities within ALTE (Association of Language Testers in Europe), for having this program accredited at a European level.

ILEI, 29an de junio, 2012.